ESPERANTO
INTERNACIA LINGVO

# ELNA-BULTENO

## ESPERANTO-LIGO POR NORDA AMERIKO

Numero 11(71) Novembro 1971

### MORTIS PHILIP VANDOR

La Esperanto-movado perdis grandaniman amikon, la 9an de oktobro, 1971, kiam mortis Philip Vandor, lernejestro de Park School, en San Mateo, Ca. Li, kun D-ro Edwin Feldman, pioniris la unuan instruadon de Esperanto en komenclernejoj de Kalifornio. Ili batalis enkonduki porinstruistan kurson en la Universitato de Kalifornio (Berkeley), kaj sukcesis konvinki la estrojn de la Kolegio de Eduko tie. La 47-jara S-ro Vandor mortis subite pro koratako. Bonvolu sendi kondolencojn al S-ino Vivian Vandor (kaj la tri filinoj) al 1212 Drake, Burlingame, Ca. 94010.

### GRUPOJ PLANIS VOJAĜOJN AL PORTLANDO

S-ro Jose Serrano aranĝis karavanon de esperantistoj de Meksikio, al la Universala Kongreso en Portlando, 1972. Grupoj venos ankaŭ el Kanado (Victoria, B.C.)per ŝipo, kaj aliaj similaj aroj formiĝas en Londono, Amsterdamo, Frankfurto, Torino, Tokio, ktp. Ĝi estos grava afero, ĉar tiu ĉi kongreso estos la unua en usono dum 57 jaroj!

### ESPERANTO ANKORAŬ VIVAS EN LONG ISLAND CITY, N.Y.

ELNA-vicprezidanto, Mark Starr, nuntempe instruas Esperanton en la Bryant Adult Center, 48th St. & 31st Ave., Long Island City, N.Y., merkrede 7:30 ĝis 9:30 vespere.

Ankaŭ, S-ro Ernest Black, R.D.#1, Saugerties, N.Y. 12477, ne nur informis nin, ke la Brooklyn Center de Long Island University instruas Esperanton, sed bonkore sendis al ni elĉerpaĵon de la ĵurnalo New York Post pri tio. Bonekonata esperantisto, D-ro Julius Balbin, estas la instruisto tie.

### BONA NOVAĴO EL CHICAGO, ILL.

La ĉefa okazo de la esperantista jaro, la Zamenhof-bankedo, estos ĉijare en Chicago unu semajno plifrue, la 4an de decembro, pro la multaj vojaĝproblemoj de la kristnasksesono, ktp. Oni esperas aŭdi paroladon pri la venonta Kongreso en Portlando, kaj, kiel sugestis la ELNA-estraro, oni esperas voĉdoni monsumon por helpi en la UK-preparado. La Chicago-Esperanto-Asocio jam donis $100 por helpi personojn, kiuj deziras ĉeesti, sed batalas naciajn monregulojn kaj aliajn mon-problemojn.

### BELAJ VERDAJ GLUMARKOJ POR LA NOVA JARO

Sendu nur 35 ¢ al la Informcentro Okcidento, 410 Darrell Rd., Hillsborough, Ca. 94010, kaj vi ricevos 18 belajn (1"X 2") glumarkojn, sur kiuj estas en kvar linioj la jenaj vortoj: "La nova jar' al vi proponu, Ĝojon kaj kontenton, Kaj abunde al vi donu, Tre bonfartan senton." Venas rapide la sesono!

### NOVA KURSO PLANITA POR PORTLANDO

S-ro James Deer informis al ni, ke la Universitato de Portlando havos kaj tri- kaj ses-horajn (de kredito) kursojn pri Esperanto, la 10an ĝis la 24a de julio, 1972, prepare al la Universala Kongreso tie. S-ro Duncan Charters estos la instruisto. La junularo (TEJO) havos sian internacian kunvenon tie ankaŭ (dum 2 tagoj). Oni penos alporti 200 studentojn al Portlando partopreni kaj la kursojn kaj la kunvenon. Ili povas loĝi malaltkoste en la Universitat-ĉambroj.

# ELNA-BULTENO

KUNFONDINTOJ
Donald Munro †
Rodney Ring

ADRESO
ELNA-Bulteno
Muhlenberg College
Allentown, Pa. 18104

VIZITO DE MONDKONATA TEKNIKIST-ADVIZISTO

S-ro Zoran Tuŝanov, agronomist-inĝeniero, kiu nun laboras kun grupo en Maroko, kaj, kiu poste laboros en Pakistano, vizitis en la regiono de San Francisco, Ca. La novaĵletero (SFERO) rakontis en la oktobra numero pri la multaj spertoj. Kiam li vizitis la komenc-lernejojn Park kaj Knolls, kaj la Abbot Jr. High, Doris Vallon tradukis por li. Jes, kvankam S-ro Tuŝanov parolas 8 lingvojn, la sola tiam komuna lingvo estis Esperanto! Demandoj rapide venis el la 500 studentoj, pri sporto, mono, viv-maniero, ktp. S-ro Tuŝanov diris, ke la mondo bezonas teknikan helpon, ke usono donas ĉiujare monsumon, el kiu la plejparto fine restas en la poŝoj de lokaj riĉuloj, kaj, malfeliĉe, malmultaj usonanoj partoprenas la teknikajn grupojn, ĉar usonaj teknikistoj ne havas la necesan lingvo-scion. Unu rezulto de la tre bonricevita vizito estis, ke ĉiuj scias: la terglobo bezonas Esperanton.

TELEVIDINTERVJUO EN WALLA WALLA

D-ro Ball de Whitman College televide intervjuis aron de lokaj esperanto-parolantoj en Walla Walla, Wa. La grupo inkluzivis S-inon kaj S-ron Estling, kaj S-inon Peggy Linker (ELNA-kasistino). Oni parolis pri la vojaĝo de la skoltoj al la internacia "Jamboree" en Japanujo, kaj ankaŭ pri la Universala Kongreso en Londono.

SERGIO DOCAL KANTAS POR LA UK-PORTLANDO

S-ro Sergio Docal, 5021 25th Pl. N., Arlington, Virg. 22207, Faris sonbendon kun esperanto-pecoj, kantitaj de si-mem, por instrui kantojn por la UK en Portlando. Li esperas kunigi grupon de gekantistoj, kiuj povus kune kantadi tie, kaj eĉ danci! Se vi dezirus tiujn surbendigitajn pecojn, bonvolu skribi al S-ro Docal, kiu, laŭ ebleco (pro la granda nombro!) respondos pri via partoprenado!

ELNA-KORESPOND-DIREKTORINO VERKIS ĴURNALARTIKOLON

Ellen A. Lewis, 15 Salisbury Rd., Brookline, Mass. 02146, verkis artikoleton pri la UK-Londono, kiu aperis en la Boston Globe, la 16an de oktobro, 1971. La bona artikoleto ne nur raportis pri la afero, sed komparis ĝin kun la nunaj problemplenaj kunvenoj je la Unuiĝintaj Nacioj en Novjorko. Pensuloj kiuj legis ĝin konsentis, ke la verko helpis la movadon.

NEPRE MEMORU MENDI UK-GLUMARKOJN

Okaze de la Kongreso en Portlando (1972), oni devas mendi glumarkojn, po 17 ¢ por folio de 10, inkluzivante poŝtkoston (100 glumarkoj=$1.50). Ĉi tiuj Portland-glumarkoj estas akireblaj je la Informcentro Okcidento, 410 Darrell Rd., Hillsborough, Ca. 94010.

NOVA BELA LIBRETO PRI ESPERANTO ANKAŬ BALDAŬ HAVEBLA

Frue en la monato de decembro, estos por lokaj kluboj haveblaj, 16-paĝa libreto nomita "The ABC's of Esperanto," farita kaj eldonita de la Channing Bete Co. Ĝi havos presliterojn, manskribojn, kaj "cartoons", en nigra kaj verda koloroj, por informi ĉiujn pri la internacia neŭtrala lingvo Esperanto. Ĉiu kostos 25 ¢, sed oni povas ŝpari monon per grandnombraj mendoj. La du Informcentroj baldaŭ anoncos prezojn.

LA REGISTRARO DE KUBO ELDONOS EN ESPERANTO

Oni anoncis en Kubo, ke nova gazeto en Esperanto baldaŭ aperos, kaj, ke oni fondis oficialan organizon nomitan "Internacia Socialisma Instituto de Esperanto." Pasintjare la Ministro de Eduko de Kubo fondis komisionon esperantan. Personoj kiuj studis la aferon diras, ke sendube la ĉefa kialo por la intereso estas, ke la teknikistaj reprezentantoj el Popola Ĉinio en Kubo jam konas Esperanton, kaj povas facile traduki (de la ĉina aŭ rusa lingvoj), kaj povas pli facile instrui scienculojn en la traduko en Esperanton ol en la traduko en Espanon.

## NI KORESPONDU

Juna angla edziĝparo (edzo 24-jara kaj edzino 20) kun du idoj, deziras korespondi pri politiko, mondaferoj, lingvoj, sciencaferoj, ktp. S-ro A.T. Brockbank, 25 Poplar Ave., Chelmsley Wood, Birmingham B27-7RD, Anglujo (England).

16-jara studento, kiu ŝatas sporton, geografion, muzikon, kaj historion, deziras korespondantojn. Kalmar Nagy Karoly, Kossuth L. Sgt. 49-51 I.9, Szeged, Hungario (Hungary).

Brazila fraŭlino, kiu amas legi diversajn gazetojn, sed ne povas aboni al ili, volas interŝanĝi leterojn, ktp., kun usonanoj. F-ino Sandra da Rocha Monteiro, Rua do Resende 99, Apto. 802-2C-06, Rio de Janeiro 20.000-Gunabara, Brazilo.

Junulo 17-jara, kiu kolektas emblemojn kaj insignojn, volas ankaŭ korespondi pri muziko, sporto, ktp. Emil Grozev, u. Osmi Mart 18, g. Ŝrimen, Bulgario.

Okcidentgermana viro, emerita dungisto por la urbadministracio, kiu antaŭ multe da jaroj korespondis kun eksterlandanoj, nun havas la tempon por rekomenci la korespondon en Esperanto. Wilhelm Schuh, Dorstenor Str. 145 A, 364 Bochum, FR-(Okcidenta) Germanio (Germany).

23-jara fraŭlino kaj 33-jara S-ino de Bulgario deziras usonajn gekorespondantojn. F-ino Antonia Kostova, Antim I-4, Plovdiv, Bulgario; S-ino D. Jordanova, Volov 32, Bjala, Rusensko, Bulgario (Bulgaria).

Agronomia inĝeniero, kiu havas 36 jarojn kaj ĵus vizitis Kalifornion, esperas korespondi pri agrikulturo kaj pri aliaj diversaj temoj. S-ro Zoran Tuŝanov, B.P. 147, Casa-Principal, Casa Blanca, Maroko (Morocco).

24-jara junulo, kiu ĉefe havas intereson en fremdaj lingvoj kaj landoj, kaj kiu kolektas bildpoŝtkartojn kaj poŝtmarkojn, volas korespondi principe kun fraŭlinoj (inter 18 kaj 24) de usono. Li esperas, ke oni sendos foton! S-ro Stefano Gelencser, Kertesz u. 11, Kaposvar, Hungario (Hungary).

F-ino kiu amas librojn, kaj kiu deziras legi la esperantan biblion, volas ankaŭ korespondi kun eksterlandanoj. F-ino Radka Ruĵansva, Str. ul. Koravetov 81, Sofia, Bulgario (Bulgaria).

32-jara fizikisto, kiu havas intereson en orientaj lingvoj, filatelo, libroj, ktp., deziras korespondantojn. S-ro Kazimerz Derlacki, ul. Solec 28 m. 25, Warszawai, Pollando (Poland).

Studentino 18-jara deziras korespondi pri literaturo, muziko, kino, kaj pri la etnografio (diversaj popoloj). F-ino Tskra Georgieva, Str. Car Samuil 13, ur. Sofia-63, Bulgario (Bulgaria).

Ĉeĥa librotenisto, kiu sincere interesiĝis en la internacia pac-movado, volas korespondi. S-ro Jiři Patera, Prubězna 1439/1, Most, Ĉeĥoslovakio.

Dentteknikisto-majstro, 33-jara, deziras korespondi kun fakuloj pri fakaj temoj. Bernd Weber, Pawlow Str. 59, 72 Borna, GDR-Germanio (Germany).

# ARTIKOLOJ

## ANKAŬ REPREZENTANTO

Ĉi tiu estas rakonteto verkita de Afif Qafity, de Jerusalemo, kiu estas la prezidanto de la Esperanto-klubo ĉe Muhlenberg College.

S-ro Lacmonto, kiu ludis trombonon en orkestro, labor-ferion deziris, iun tagon. Li petis sian amikon, S-ro Bonhomo, ke li partopreni en la orkestro, dum la vesperprogramo, kiel reprezentanto.

Sed S-ro Bonhomo ekscite respondis, " Ne! Mi neniam en la vivo ludis trombonon, kaj mi ne scius kion fari!"

S-ro Lacmonto respondis, tamen, "Ne gravas. Nur ŝajnigu, ke vi ludas - Blovu la vangojn, kaj faru tiun, kion faras la alia trombonisto."

Fine, S-ro Bonhomo jesis la inviton, kaj li promesis fari tion. Fine, la orkestro komencis ludi. S-ro Bonhomo sidis kaj faris ĉion sammaniere kiel la alia trombonisto de la grupo. La muziko estis bela.

Sed tiam venis la momento en kiu devus esti trombon-sol-ludo. La aŭdantaro miregiĝis, ĉar tie sidis du trombonistoj, kiuj forte blovis la vangojn kaj funkciigis instrumentojn - sed ne venis sono iu ajn el la trombonoj!!

La alia estis ankaŭ reprezentanto.

## MIA PENSO

Dankon al S-ro A. Holzhaus, de Columbus, Ind., Kiu permesas al ni inkluzivi parton post parto, de la Originalaj Poemoj de L. Zamenhof. Ni komencu :

Sur la kampo, for de l'mondo,
Antaŭ nokto de somero,
Amikino en la rondo
kantas kanton pri l'espero.
Kaj pri vivo detruita
Ŝi rakontas kompatante, -
Mia vundo refrapita
Min doloras resangante.

"Ĉu vi dormas? Ho, sinjoro,
Kial tia senmoveco?
Ha, kredeble rememoro
El la kara infaneco?"
Kion diri? Ne ploranta
Povis esti parolado
kun fraŭlino ripozanta
Post somera promenado!

Mia penso kaj turmento,
Kaj doloroj kaj esperoj!
Kiom de mi en silento
Al vi iris jam oferoj!
Kion havis mi plej karan -
La junecon - mi ploranta
Metis mem sur la altaron
De la devo ordonanta!

Fajron sentas mi interne,
Vivi ankaŭ mi deziras, -
Io pelas min eterne,
Se mi al gajuloj iras...
Se ne plaĉas al la sorto
Mia peno kaj laboro -
Venu tuj al mi la morto,
En espero - sen doloro!

# POR STUDANTOJ

## S-RO ANASULO KAJ SIA FAMILIO

Tiu ĉi estas infanrakonto verkita de Sonya K. Watts, kiu lernis septembre,'70.

Iun belan posttagmezon, S-ro Anasulo vekiĝis post dormeto. Li staris, kaj diris al sia edzino, "Nataŝa, estas printempo. Estas nun la tempo, ke ni havu familion. Ĉu vi deziras infanojn?"

"Jes, Boris," respondis Nataŝa. "Mi deziras infanojn. Sed unue, ni devas trovi novan hejmon. Ĉi tiu loko ne estas bona. Mi volas trovi pli belan lokon por havi nian familion."

"Tre bone. Mi helpos vin serĉi."

Do, gesinjoroj Anasulo diris "Ĝis Revido" al siaj amikoj kaj najbaroj, kaj ekiris por trovi novan hejmon. Post nelonge, ili alvenis je bela loko proksime al altaj arboj kaj blua lago.

"Mi ŝatas ĉi tiun lokon," decidis Nataŝa. "Ĝi estos la plej bona loko por havi infanojn."

"Mi ŝatas ĝin, ankaŭ," konsentis Boris. "Rigardu la kamparon - la arbojn kaj la akvon!" Li rigardis ĉirkaŭen. "Mi volas kontroli la akvon. Mi naĝos dum vi faras la neston."

"Ne, edzo mia," diris Nataŝa, kun rideto. "Vi devas helpi min. Kaj - Mi timas, ke, eble, estas lupoj." Ŝi rigardis la kamparon kun grandaj okuloj.

"Ho, vi serĉas!" ridis Boris. "Ne estas lupoj en ĉi tiu kamparo. Tamen, mi restos por helpi."

Kune la du anasoj trovis lokon por sia nesthejmo. Ĝi estis apud la lago sub densaj arbetoj.

"Nun mi devas havi sekan herbon. Ĉu vi helpos min?" demandis Nataŝa.

"Ho ve!" diris Boris, kiu volis naĝi, ne labori. "Jes, edzino mia."

Baldaŭ la nesto finiĝis. Kaj dum la sekvantaj dek tagoj Nataŝa iris al sia nesto. Ĉiumatene ŝi demetis alian ovon. Tiam, ŝi kaj ŝia edzo marŝis tra la arboj, naĝis en la lago, aŭ dormis en la suno, proksime al sia nesto.

Post dek tagoj kaj dek ovoj Nataŝa komencis kovi la ovojn. Nun Boris ne marŝis tra la arboj aŭ naĝis en la lago. Dum la tago li restis proksime al la nesto kaj sia edzino. Je nokto li dormis apud la nesto.

Ĉiutage Nataŝa eliris la neston, manĝis kaj naĝis tre rapide, tiam reiris al la nesto. La ovoj devas esti varmaj.

Post tridek tagoj Nataŝa estis laca, ĉar dum tridek tagoj kaj noktoj, ŝi kovis la ovojn. Kaj Boris estis laca. Li devas resti proksime al la nesto. Li ne povas naĝi aŭ viziti kun la amikoj. Li devis resti kun sia edzino kaj protekti ŝin, ĉar ŝi kredis, ke estas lupoj en la kamparo.

Fine, la ovoj komencis elkovi. Nataŝa kaj Boris ekscitiĝis! Post nelonge estis dek anasidoj! Nataŝa estis tre kontenta patrino. Boris estis fiera, sed ankaŭ maltrankvileta. Baldaŭ li devos konduki sian novan familion al la lago kaj tra la kamparo por manĝi. Li devos helpi Nataŝan protekti la infanojn. Tamen, Boris kaj Nataŝa estis tre bonaj gepatroj. Ĉiuj vivis ĉiam feliĉe.

---

BONVOLU ELTRANĈI LA SUBAN PARTON KAJ SENDI ĜIN, KUN MONO, AL LA KASISTINO:

Peggy Linker, 1414 Monroe St., Walla Walla, Wa. 99362

---

ELNA 197__

Mi enmetas la kotizon kiel subindikitan. Mia nomo kaj adreso ĝuste aperas sur la alia flanko (dorsflanke).

KONTRIBUANTA MEMBRECO

___KONSTANTA ($8.00)
___EDZIĜPARA ($12.00)
___SUBTENA ($15.00)
___PATRONA ($25.00)
___DUMVIVA ($160.00)

Mi elektas la jenan senpagan gazeton:
___HOMO KAJ KOSMO
___NORDA PRISMO
___HEROLDO (nur novaj abonantoj)

____KUNDONACO

* * * * * * * * * * * * * * * * * * *

___STUDANTO ($3.00), plentempa kaj malpli ol 30-jaraĝa
___EKSIĜULO ($4.00), pli ol 62-jara post kvinjarabono.

_____NASKIĜJARO

NOVA ABONO_____

_____ABONRENOVIGO

## OFICIALA ELNA-ADRESARO

PREZIDANTO
Francis E. Helmuth
5526 Beaumont Ave.
La Jolla, Cal.
92037

VICPREZIDANTO
Mark Starr
3940-47th St.
Long Island City
New York, 11104

SEKRETARIO
Robert E. Bailey
147 Birch Street
Redwood City, Ca.
94026

KASISTINO
Peggy Linker
1414 Monroe St.
Walla Walla, Wash.
99362

KORESPOND-DIREKTORINO
Ellen A. Lewis
15 Salisbury Rd.
Brookline, Mass.
02146

UEA-ĈEFDELEGITO
Armin Doneis
P.O. Box 105
Pharr, Texas
78577

INFORMCENTRO OKCIDENTA
410 Darrell Road
Hillsborough, Cal.
94010

ARKIVISTO
D-ro B. J. Balcar
62 Via Castanada
Monterey, Ca.
93940

INFORMCENTRO NOVJORKA
156-5th Ave. Rm. 821
New York, N. Y.
10010

## ALDONOJ AL LA UK-FONDUSA LISTO DE DONACINTOJ

A.M. Brya (Ill.), Jim Deer (Ore.), Leroy B. Edwards (Ca.), S-ino H.B. Ellis (N.Y.), Fred H. McMann (N.Y.), Rodney Ring (Pa.), S-ino Verda Snyder (Ore.), Sidney Steinberg (Pa.), kaj S-ro Roan Orloff Stone (N.M.).

KAJ ANKAŬ

Peg Barkley, Mrs. H.B.Ellis, Allan Boschen (Mass.), Helen Hasselriis, Sally Mikkelson, Paul J. Mimlitsch (N.J.), Cecelia Peterson, Mark Starr (N.Y.), Glenn Turner (Wisc.), Doris Vallon (Ca.), Ken Ver Ploeg. La Esperanto-Societo Von Nimitz de San Antonio, Texas, ankaŭ donis monon. S-ino Jaquline Reynolds, 1209 18th St., Golden, Col. 80401, donis $100.00, kvankam ŝi ne estas esperantistino: ŝi donacis memore al la edzo, Paul, kiu subtenis Esperanton.

* * * * * * * * * * * *

La kasistino diras, ke pluraj menciitaj personoj donas regulare dum la jaro.

---

ESPERANTO LEAGUE FOR NORTH AMERICA
156 FIFTH AVENUE, NEW YORK, N.Y. 10010

NON-PROFIT ORG.
U. S. POSTAGE
Paid
Kutztown, Pa.
Permit No. 8

RETURN POSTAGE GUARANTEED
ADDRESS CORRECTION REQUESTED

[redacted]

E1